

[noto] eldonita de BLE, 1936

el la angla tradukis Geo H. Yoxon

originalo: Edwin Arnold "The Light of Asia"

LA LUMO DE AZIO (OKA LIBRO)

PREDIKO DE LA BUDHO el la OKA LIBRO de LA LUMO DE AZIO

LA BUDHO, reveninte al la palaco de sia patro, sidiĝis en la ĝardeno, dekstra-flanke de la reĝo, kiam estis vespero; kaj ĉirkaŭsidis la nobeloj de la regno kaj granda amaso de la popolo, por aŭdi liajn vortojn. Eĉ la tago kaj la nokto ŝajnis halte stari por aŭskulti, dum la Budho parolis ĉi tiujn vortojn antaŭ la reĝo:

OM AMITAJO! Vorte ne mezuru,
Nek faru provon sondi, ho pensanto,
Nemezureblan la profundegecon,
Eraras demandant' kaj respondanto.

Laŭ l' Libroj — sole Braĥm' en la komenco
En plenmallumo sidis meditante;
Sed ne rigardu tien, la komencon,
Aŭ Braĥmon, aŭ por ia lum' serĉante.

Ĉu mortemulo vidos per okuloj?
Ĉu mens' kapabla scii iam estos ?
Vualo post vualo jen leviĝas:
Vualo post vualo tamen restos.

Iradas steloj; ne demandon faru.
Sufiĉas ke ekzistas mort', vivado,
Ĝoj' kaj malĝojo, kaŭzo kaj rezulto,
Kaj tajd' de Esto, kiu kun fluado

Ŝanĝanta ĉiam, kaj kuranta kiel
Rivero, malrapida aŭ rapida,
Post ondon ond', la sama sed ne sama,
De l' fonto kuras ĝis la mas' fluida

En maron fluas. Poste vaporiĝas,
Kaj jen fariĝas nuboj ekpluvontaj,
Ondetoj tiuj ĉi, por ree gliti
Sen paŭz' aŭ paco laŭ deklivoj montaj.

Sufiĉas scii, ke la mond' ekzistas,
La fenomenoj, ĉiuj kun ŝanĝado,
De baraktado estas ĝi radego,
De kiu estas nepra la turnado.

Ne preĝu! Pro ĉi tio ne heliĝos
Mallumo! De l' Silento muta petu
Nenion! Per penegoj piaj mensojn

Neniel viajn dum moment' ĝenetu.

Gefratoj ne atendu pro oferoj,
Donacoj, aŭ kantad' de sanktaj nomoj,
De l' dioj ion. Vin nur vi mem savos;
Malliberejojn siajn faras homoj.

Posedas ĉiu, kian plejfortuloj,
Regadon tian: ĉar al ajn estaĵo,
Kaj povoj ĉiuj, ĉie — la malĝojo
Aŭ ĝojo sekvas laŭ la faritaĵo.

Laŭ estintaĵoj estos estonteco,
Kaj bono aŭ malbono nun fariĝas.
De l' bonaj faritaĵoj rikoltante
La fruktojn, nun Anĝeloj feliĉiĝas.

Diabloj pagon en inferoj faras
Pro pekoj antaŭ longa temp' faritaj.
Nenio daŭras: per la temppasado
Virt' kaj malvirto estas nuligitaj.

La sklavo eble kiel Princ' revenos
Pro la merit' kaj indo jam gajnita;
Pro faroj kaj nefaritaĵoj, Reĝo
Vagados ĉien per ĉifon' vestita.

Eĉ super Indro vi vin povos levi,
Aŭ sub, de l' verm' aŭ kulo, la malforto

Subpremi vin. El vivserioj multaj
Rezultas tiu, aŭ ĉi tiu sorto.

Turnadas tiu rado nevidebla,
Kaj ne utilas por ripoz' sopiro.
Grimpanto povas fali, falint' grimpos,
Ne ĉesas de l' radioj la rondiro.

Se katenita estus vi sur tiu rado
Per ĉeno nerompebla, ve! la koro
De la senlima Esto malben' estus,
De Ĉio estus la anim' doloro.

Ligita vi ne estas! Dolĉa estas
L' anim' de Ĉio kaj de Est' la koro;
Pliforta estas volo, ol malĝojo:
La bono movas ĝis Plejbona Gloro.

Mi, Budho, kies kor' krevita estis,
Kiu priploris pri l' plorad' de ĉiu,
Ĝojegas, ridas, ĉar la Libereco
Ekzistas! Suferantoj, vi ! ho sciu,

Vi pro vi mem suferas. Vin neniu
Devigas vivi, morti, eternecon
Turniĝi sur la rado, karesante
Radiojn dolorigajn, malplenecon

De l' nabo, kaj radrondon de plorado.

Jen, Veron montras mi! Super Ĉielo,
Sub la infero, preter loĝej' de Braĥm',
Eĉ preter la plej malproksima stelo,

Antaŭ komenco, kaj sen iu fino,
Eterna kiel spaco, Povo dia,
Kiu iradas al la Bono, estas;
Nenio daŭras krom leĝaro ĝia.

Floranta rozo montras ĝian tuŝon,
Lotusfoliojn, ĝi formante fleksas
La manon: ĝi Printempan Robon, kaŝe,
En la silent' de l' grund' kaj semoj teksas.

Pentraĵo ĝia estas en la nuboj,
Smeraldoj ĝiaj en plumar' de l' pavo;
Postenoj ĝiaj estas steloj; fulmo,
Vent', pluvo, estas ĉiu ĝia sklavo.

El konkoj faris ĝi la fazankolon,
El mallum' koron en la homa sino:
Agante ĉiam, faris ĝi belecon
El la haos' antikva kaj ruino.

L' ovojn en birdeta nesto estas
Trezoro ĝia; por mielkaliko
L' abelĉelo; la metodojn ĝiajn
Scias turto blanka kaj formiko.

Fortigas ĝi flugilojn de l' aglino,
Dum hejmen portas ŝi la kaptitaĵon ;
Al l' idoj gvidas vulpon; ĝi provizas
Por neamat' amikojn kaj manĝaĵon.

Ne difektiĝas ĝi, nek malhelpata
En nepra funkciado ĝi efikas:
La dolĉan blankan lakton donas, ankaŭ
Venenon, ĝi, per kiu serpent' pikas.

Muzikon ĝi laŭtaktas de la orboj,
En pretervido de ĉiel' kupola;
En la profunda ter', de ĝi kaŝita,
Troveblas or', kaj ĉiu gem' malmola.

Sekretojn siajn ĉiam ĝi malkaŝas,
En la aleoj de l' arbar' sidante;
Semetojn zorgas ĉe l' radik' de l' cedro,
Foliojn, florojn, ĝi evoluante.

Mortigas, savas ĝi ne efektita,
Ĝi celas nur plenumon de la sorto;
Fadenoj ĝiaj estas Am' kaj Vivo,
Teksilbobenoj la Dolor' kaj Morto.

Ĝi faras kaj malfaras, riparante;
Superas faritaĵon farataĵo:
Inter flegemaj ĝiaj manoj kreskas
La plano de l' belega desegnaĵo.

Vidiĝas tiel la laboro ĝia;
Sed plie, en aferoj nevideblaj,
La homaj koroj, mensoj, voloĵ, estas
Ligiloj de la Leĝo konstateblaj.

Fidele helpas ĝi vin nevidata,
Parolas neaŭdata super ŝtormo.
Kompat' kaj Amo estas bonaj, ĉar el
Mas' blinda, pro luktad' muldiĝis formo.

Kiu ĝin servas, tiu gajnas; pacon
Ĝi pagas por la bono: kaj suferas
Malbonfaranto, kiu ĝin malhelpas;
Nenies malestimon ĝi toleras.

Ĝi vidas ĉie kaj rimarkas ĉion;
Ĝi rekompencos pro la bona ago;
Eĉ unu malbonagon ĝi finfine
Kvitigos per egala puna pago.

Ĝi konas nek pardonon nek koleron;
Mezuras pezon ĝi de ĉiuj agoj;
Por ĝi la tempo ne valoras iel,
Morgaŭ ĝi juĝos, aŭ post multaj tagoj.

Pro tio mortigisto sin mortigas,
Kaj defendanto mankas al juĝisto
La falsa; sin kondamnas vort' mensoga;

Nur por repagi ŝtelas la ŝtelisto.

La Leĝo tia estas, ne finhelpos
Ke iu kontraŭstaru ĝin aŭ neu;
Am' ĝia koro, Pac' la fino estas,
Kaj dolĉa la efektivig'. Obeu!

La Libroj pravas, Fratoj! Ĉies vivo
Rezultas el vivad' en l' estinteco;
Malĝojon naskas la malbon' pasinta,
Naskiĝas el la bono feliĉeco.

Rikoltos vi la semitaĵon! Kreskas
La samo kiu estis jam semita.
Jam sciis la Silento kaj Mallumo!
Kaj tiel estas homa sort' naskita.

Li, rikoltanto de semaĵoj siaj,
Semitaj en l' antaŭaj vivoj, venas;
La greno, ankaŭ la herbaĉoj, kiuj
Lin, kaj la teron, pestas kaj venenas.

Se li forigas tiujn ĉi herbaĉojn,
Kaj anstataŭas ilin per semar' fortika,
Estos la ter' fruktdona, bela, pura,
Rikolto riĉa, la labor' efika.

Se li, vivan', per pacienc' eltenos,
La fonton de malĝojo jam lernante,

Pro malbonfaroj siaj longpasintaj,
Per Am' kaj Vero, pagon celadante,

Se li purigas sin de la mensogo
Kaj la avid' de l' memo, ne kaŭzante
Ies suferon, ĉion tolerante,
Ofendon nur per bono repagante,

Se ĉiutage vivas li komplete,
Kaj faras li puramon vivmotivo,
Ŝirante for teneman la deziron,
Ĝis tute ĉesas amo al la vivo,

De li restaĵo tuta fine estas,
De lia viv', saldita tuta konto,
Malbon' kvitita, bono forte viva,
Ke tiel fruktoj sekvos por l' estonto.

Jam finis tio, kio ekkomencis.
Kun li, ĉar viv', por li, per sama nomo
Ne plu koniĝas; li plenumon faris
De l' celo kiu lin elfaris Homo.

Ne interrompos pacon la ĉiaman
Ĝoj' kaj malĝojo mondaj; li sopiras
Neniam plu; lin pekoj ne makulos;
Nek revenados viv' kaj mort'. Li iras

En la Nirvanon. Ja li ĉesas vivi,

Sed estas li la Viva Unuaro,
ON, MANI PADME, OM! Jen la Rosero
Perdiĝas en la sin' de l' brila maro!

Jen la doktrino de la Karmo. Lernu!
Kiam forestas feĉ' de pekoj, kiam
Viv', kiel eluzita flamo, mortas,
Kun ĝi la morto mem formortas tiam.

Ne diru vi, *mi estas, - estis, - estos,*
Ne pensu ke, korpdomojn trapasante,
Vi bone loĝas, aŭ malbone, kiel
Vaganto, — memorante, forgesante.

Plejlasta el multvivoj, tiu sumo,
En l' universon nove jen ekiras.
Loĝejon faras ĝi, kaj en ĝi loĝas,
Samkiel la silk-raŭpo sin drapiras.

Funkcion, formon, kiel ov' serpenta
Ekkoviĝinta, ĝi por si ekprenas;
Aŭ kiel herba semo blove vagas,
Ĝis al la taŭga grundo ĝi alvenas.

Ekiras ĝi por helpi aŭ difekti.
Je l' frap' de Morto, ekvagadas flame
Nepurigita la fragmento lia,
Sur vento pesta, ruĝe kaj malame.

Sed, je la morto de bonul' ekspiras
Dolêvento, kaj la mondo pliriĉiĝas,
Kiel subteriĝinta rivereto
Ree, kaj plilarĝbrile, ekvidiĝas.

Tiel merit' gajnita plifeliĉan
Epokon gajnas, kiu pro alie
Ne atingiĝus; tamen Amo regos,
Antaŭ ol Kalpas-fino, Reĝo ĉie.

Malhelpas la mallumo, Fratoj! kiu
Naskas nescion: kredas vi pro tio
La ŝajnojn veraj, kaj sopirtenadas
Avidojn malĝojigajn de pasio.

Vi kiuj vole laŭ la Meza Vojo,
Trankvila, de Rezon' montrata, paŝos
La Altan Vojon al Nirvano, aŭdu
Dum la Kvar Noblajn Verojn mi malkaŝos.

Malĝojo estas la Unua Vero.
La vivo, kiun tiom vi avidas,
Suferegado estas: sole daŭras
Doloroj; la plezuroj forrapidas.

Doloroj de l' naskiĝ' kaj infaneco,
Juneco vigla, kaj matura forto;
Doloroj de l' malvarmaj grizaj jaroj,
Kaj morto, estas via tuta sorto.

La kusenantajn mamojn, lipojn logajn,
De l' Amo kisos funeralobrulo;
Milita Forto estas brava, tamen
Vulturoj manĝas karnon de Ĉefulo.

Ter' estas bela, sed l' idaro ĝia,
Por vivi sange inter si batalas.
Safiraj la ĉieloj estas, sed al homoj
Soifegantaj ne eĉ guto falas.

Demandu malsanulon, funebranton,
Kaj maljunulon, "Ĉu vi vivon ŝatas?"
Respondos ili: saĝe la infano,
Pro la naskiĝo plore sin kompatas.

La Dua Vero:- kaŭzo de Malĝojo.
Kiu malĝoj' ne pro Dezir' kaŭziĝas?
Per la kuniĝ' de sentoj kaj perceptoj
La flamo de pasio ekbruliĝas.

Flamegas tiel *Trishna*, soifego.
Avide vi al ombroj, songoj, tenas;
En mezo falsan memon vi starigas,
Kaj iluzian mondon ĉirkaŭprenas,

Al la altaĵoj malproksimaj, blindaj,
Surdaj al sonoj de Zefiraj ventoj,
Mutaj ĉe la alvok' al vera vivo

Liberigita de malveraj sentoj.

Do, kreskas la malamo kaj avido,
Prosperas la envioj kaj eraroj,
Trompitaj koroj krevas, larmoj fluas,
Sangmakulatajn jarojn sekvas jaroj

Per ruĝaj negvidataj la piedoj.
Do, kie kreskus greno fruktodona,
La lolo radikiĝas kaj floradas,
Apenaŭ restas spac' por semo bona.

Kaj venenita la anim' foriras,
Kaj Karmo ree venas soifante;
Sentplene saturita rekomencas
La Memo, novajn trompojn laborante.

La Tria:- la Ĉesigo de Malĝojo.
Jen estas Paco: venki la Memamon,
Elŝiri el la brusto la pasion,
Estingi la tumultan enan flamon;

Por amo la Eternan Belon teni;
Por gloro esti de si mem Reganto;
Por ĝojo vivi preter eĉ la dioj:
Por riĉegeco esti kolektanto

De la trezor' de servoj bonfaritaj,
Per dolĉparol', boneco kaj puragoj:

Riĉecon tian ne forrabos morto,
Nek forvelkigos ĉiuj vivaj tagoj.

Malĝoj' finiĝas, ĉar la Viv' kaj Morto
Ĉesiĝas; lampo senolea cedas;
Malnova kont' saldiĝas, nova estos
Plenpura; tiel pacon hom' posedas.

La Kvara Vero estas de la Vojo.
Larĝmalfermata, klara kaj facila,
La Nobla Voj' Okera, ĝi kondukas
Rekte al paco kaj rifuĝ' trankvila.

Multaj vojetoj al montpint' kondukas,
Al kie neĝon volvas nub' orstria;
Laŭ la deklivoj krutaj aŭ malkrutaj,
Grimpanto venos al la mond' alia.

Fortuloj povas riski supreniron,
Laŭ krutegaĵ' danĝera furioza;
La malfortuloj, laŭ facilaj bretoj,
Iradas nur kun ofta paŭz' ripoza.

L'Okera Voj' al paco estas tia:
Kun tre diversaj gradoj de kruteco.
Per rapideco laŭ l'anima forto,
Grimpados ĉiuj ĝis la neĝ-heleco.

L' Unua breto estas Prav-Doktrino.

Respektu Darmon, marŝu evitante
Ofendon, atentante Karmon, kiu
La sorton faras, sentojn superante.

La Dua estas Prava Cel'. Vi estu
Al ĉiuj kiuj vivas, bondezira,
Lasante morti ĉian malbonecon;
Similu via viv' al vent' zefira.

La Tria estas Prav-Parolo. Zorgu,
Ke ĉiam estu bonaj kaj ĝentilaj
La vortoj elirante la lippordojn,
El, kvazaŭ, la ĉeest' de Reg', trankvilaj.

La Kvara estas Prav-Kondut'. Per agoj
Kreskiĝu bono, kulpoj forvehkiĝu:
Kvazaŭ arĝenta ŝnur' tra kristalgloboj,
En bonaj agoj amo tramontriĝu.

Plialtaj bretoj, Prav-Purec', Prav-Pensoj,
Soleco kaj Ĝojego Pravaj, restas.
Nur tiuj ilin povas paŝi, kiuj
Ne plu ligataj de la mondo estas.

Ne Sunen celu per flugiloj junaj!
Dolĉa la malalteco jam pruvita,
Kaj sendanĝera, estas; nur fortuloj
Forflugas de la nest' memkonstruita.

Kara la amo estas familia,
Agrablaj amikeco kaj kutimoj,
Produktas bonon afablec' de l' Vivo,
Firmaj, sed falsaj, estas ĝiaj timoj.

Vivu ĉi tiel, se vi devas; faru
Orajn ŝtuparojn el la malforteco;
Leviĝu, per vivad' kun fantazioj,
Al la plialtaj beloj de vereco.

Tiel vi iras ĝis altec' pli klara,
Vojetojn pli facilajn eltrovante,
Pli fortan volon por la sentojn venki,
Pli da purec', la Vojon enirante.

Kiu atingas tian ekkomencon
Konas la Noblajn Verojn kaj la Vojon;
Jam trafas li Etapon la Unuan,
Fine atingos la Nirvanan ĝojon.

Ĉe la Etapo Dua kiu staras,
Lin ne plu duboj, iluzioj, tenos;
Regas avidojn li, lasas la kultojn,
Nur unufojon li al viv' revenos.

Antaŭe estas la Etapo Tria:
Pure ĉi tie la spirit' leviĝas,
Ĝis pura amo, paco. Je l' vivfino
La karcerejo de la viv' rompiĝas.

Sed estas tiuj, kiuj nepre iras
Al fina celo, vivaj kaj vidataj,
Per la Etapo Kvara de l' Sanktuloj -
Budhoj - kaj senpekuloj la beataj.

Dek, kvazaŭ mortigitaj malamikoj,
Malvirtoj kuŝas laŭ l' Etapoj tiaj:
Memamo, Dubo, Falsa Kred', tri estas,
Malamo kaj Volupto, du aliaj.

Kiu ĉi tiun kvinon venkis, tiu
Jam Tri Etapojn paŝis el la Kvaro.
Restas Memlaud', Sopir' al Paradizo,
Amo al Viv', Fiero kaj Eraro.

Kvazaŭ staranto sur neĝpinto jena,
Ne superata krom per blu' senlima,
Venkinte tiujn pekojn homo venas,
Al la Nirvano-rando, plej proksima.

Envias lin la dioj el malalte;
Mondruiniĝoj tute ne lin skuos;
Vivitaj ĉiuj vivoj estas, mortoj
Mortitaj; ne plu Karmo rekonstruos

Novdomojn. Ne celante ion, ĉion
Li gajnas; memcedante, "Mi" fariĝas
La Universo. Ies instruo ke

Nirvano estas ĉesi, denunciĝas

Kiel mensogo. Se instruas iu,
Nirvano estas vivi, li eraras,
Ĉi tion nesciante, nek ĝojegon
Krom-vivan kaj kromtempan, kiu staras

Brilantan post rompita lia lampo.
La Vojon ekeniru! Kiam ĉesas.
Malvirtoj Malĝoj' ĉesas! Kiu venkas
Unu ematan pekon bonprogresas.

La Vojon ekeniru! Tie fluas
Sanigaj akvoj! Tie belaj floroj
Eternaj kovras vojon per ĝojego!
Tie rapidas la plej dolĉaj horoj!

La Leĝo pli valoras ol juveloj,
Pli dolĉa estas ol mielo guste,
Ravegas pleje. Por laŭ ĝi vivadi
Aŭskultu al la Kvin Reguloj ĝuste -

Ne pro kompat' - mortigu, kaj pro tio
Ke, dum ankoraŭ supren vojon sian
Laŭiras eĉ estaĵo plej humila,
Vi ne haltigu la iradon ĝian.

Libere donu, kaj ricevu ankaŭ,
Sed ne forprenu tion de alia,

Per avareco, forto, aŭ per trompo,
Kio jam estas posedaĵo lia.

Ne kalumniu, nek atestu false,
Nek diru, de mensogo abomena,
La vortojn; la Vereco sole estas
Parolo de la plenpureco ena.

Evitu drogojn kaj trinkaĵojn tiajn,
Kiaj alportas al prudent' malbonon;
Ne havas puraj mensoj, puraj korpoj,
De la sukaĵo Soma, la bezonon.

Ne tuŝu la edzinon de najbaro,
Nek faru iujn agojn malpudorajn,
Agojn devenajn de la besta karno,
Sentaŭgajn, kontraŭleĝajn, malbonmorajn.

Tiel la Majstro parolis, kaj multaj aniĝis al la Ordeno, kiun li fondis. La doktrino, kiun li instruis, kaj la Frataro de liaj disĉiploj, restas ankoraŭ ĝis la nuna tempo, por helpi la mondon.

Finpresita la lan de Junio 1936.